

ENHAVO:

1. La 10-a kongreso de CxEA kaj la solenajxo omagxe al centjarigxo de KEP
2. La inundo ne sukcesis mortigi la eldonejon KAVA-PECH
3. Alvoko por acetintoj de La Nova PIV kaj propono de donaco de subakvigataj ekzempleroj
4. IBIRE kaj KAEST okazos lauxplane

1. LA 10-a KONGRESO DE CxEA kaj LA SOLENAJxO ...

Ne forgesu plani venon al Prago ekde la 15-a gxis la 17-a de novembro, kiam okazos la 10-a kongreso de CxEA (kiu inter alie elektos la novan CxEA-estraron) kune kun la solenajxo de centjarigxo de Klubo de Esperantistoj en Prago. Ne pretervidu: en Starto 3/2002 aperos fine de septembro pli precizaj informoj priaj kune kun la aligxilo.

2. LA INUNDO NE SUKCESIS MORTIGI LA ELDONEJON KAVA-PECH

Dum la posedanto de la eldonejo KAVA-PECH forestis pro UK, la inundo atakis la eldonejan stokejon/ekspedejon kaj garagxon. La filino sukcesis savi la auxtomobilon kaj preskaux cxiujn elektronikajn ekipajxojn, sed nur parteton de la libroj. Preskaux cxiu stoko dronis sub pli ol 2metra akvo, inter ili cxiuj Esperanto-titoloj krom proks. duono de la stoko de Gramatiko de Esperanto (proks. 300), kiuj estis savitaj.

Kvankam la stokejo ne estis asekurita (neniu povis ecx imagi, ke iam povus transigi la akvo de Berounka la altan valon konstruitan kontraux "centjara akvo" kaj rabistoj ja ne okupigxas pri libroj) la eldonejo povas tujaux rigi sian aktivecon. Unue, malgranda parto de la librostoko estas felice komisie cxe pluvendistoj, kiujn mi nun parte reprenos por havi ilin por rektaj mendantoj, kaj due, la financa helpo ofertita de miaj Esperanto-amikoj jam kolektis suffice da mono, ke eblas noveldoni la cxijarajn tri novajxojn en Esperanto, de kiuj komplete dronis la tuta stoko dum mi prezentis ilian eldonon en Fortaleza UK.

Al cxiuj, kiuj helpis al mi per siaj manfortoj forigi la inunditajn librojn, meblojn, koton kaj la ceterajn sekvojn de la inundo (precipe al Zdenek Pluhar kaj geedzoj Bloudek), sed ankaux al tiuj, kiu per sia donaco helpas al mi auxrigi la aktivecon de la Esperanto-fako de mia eldonejo, mi esprimas publike koran dankon. Mi devas konfesi, ke mi estis kortusxita, kiom da samideanoj interesigxis pri la sorto de mia agentejo vidante la inferon en Dobrichovice en televido kaj kiuj ofertis helpon (multajn mi devis

malakcepti, cxar ne estas loko por tiom da personoj labori tie samtempe kaj estas klare, ke helpis al mi ankaux familianoj).

Eble mi aldonu, ke la samnoma kongresa kaj turisma agentejo ne estis tuxsita de la inundo, cxar la oficejon, kie estas cxiuj kurantaj materialoj (kontraktoj, mendoj, ofertoj, ...) trovigxas en du cxambroj de mia logxejo en sekura dua etagxo) - krom la arhxivo de estintaj arangxoj, kiuj ankaux dronis en arhxivo, sed kies malapero neniel malhelpas plenumon de cxiuj miaj sindevigoj.

Petro

#### ALVOKO AL ACxETINTOJ DE NOVA PIV KAJ SPECIALA OFERTO

ni petas cxiujn acxetintojn de La nova PIV, ke ili donacu sian malnovan PIVon al iuj samideanoj, kiuj pro la prezo ne povas pensi pri la acxeto de La nova PIV. Tiamaniere vi helpos al altigo de ilia lingva nivelo. Se vi ne scias, al kiu donaci, bv. sendi gxin al la adreso de Petro Chrdle, Anglicka 878, 252 29 Dobrichovice kaj la kolektitaj malnovaj PIVoj estos ofertitaj dum la CxEA-kongreso.

Krome, felicxe el cxiuj PIVoj, kiujn havis produktanto de la novaj PIV, KAVA-PECH, je dispono kiel pluvendisto, restis nur 7, kiuj do ankaux dronis kun la ceteraj libroj. Malsame kiel la ceteraj libroj, tiuj estis savitaj kaj 5 jam donacitaj al samideanoj, kiuj provas sekigi ilin kaj sekve utiligi, do 2 ankoraux restas je dispono. Ne forgesu, ke temas pri ege malsimpla kaj temporaba afero (la seka PIV pezas 1,7 kg, la inundita 3.4, do enestas en la papero 1.7 kg da akvo!), sed se iu volas provi, bv. skribi al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni sendos gxin al vi senpage (klare ke nur al la du unuaj alskribintoj) kune kun la rekomendo, kiel savi valorajn inunditajn librojn.

#### 4. IBIRE kaj KAEST OKAZOS LAUxPLANE

Multaj de vi vidis en televido, kiel aspektis Dobrichovice aux kiel gxi aspektas nun post la inundo. Sed sciu, ke oni montras nur la cxeriveran parton, dum la pensio Sokol, en kiu okazos kaj IBIRE, kaj KAEST, estas tiom for, ke gxi restis komplete seka dum la tuta inundo kaj do neniuj de la planataj arangxoj estas endangxerigita.

Mi rememorigu vin, ke IBIRE (Internacia biciklista renkontigxo) okazos inter la 10-a kaj 15-a de septembro kaj kvankam ni devos improvizi en elekto de itineroj pro damagxitaj vojoj kaj mankantaj pontoj, kredu, ke la Bohemia Karsto estas tiom bela, ke certe cxiuj partoprenantoj estos kontentaj. Pro aligxintoj el Francio kaj Germanio, kiuj jam konfirmis sian venon ankaux post la inundo, regos certe internacia samideana etoso tie.

KAEST (Konferenco aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) kiun arangxas CxEA sub auxspicioj de UEA kaj organize gxin garantias KAVA-PECH, okazos inter la 8-a kaj 15-a de novembro, kun antauxaj samlokaj terminologiaj seminarioj, paralele je la temoj "trafiko" kaj

"matematiko" - tiuj komencigos jam la 6-an de novembro. La temoj de KAEST estas: Sekcio A: Elektronikaj rimedoj, Sekcio B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto Sekcio C: Scienco kaj Tekniko gxenerale. Jam aligxis partoprenantoj de BG, BiH, CZ, DE, DK, FR, GB, SK, USA.

Al ambaux arangxoj ankoraux eblas aligxi. Se vi planas dum KAEST prezenti vian kontribuajxon, bv. ne heziti kaj sendi rapide ne nur la aligxilon, sed ankaux resumon gxis 50-vortan por la programkajero. Pli precizajn informojn kaj aligxilojn por ambaux arangxojn vi ricevos cxe <[chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)>